# La Bulteneto

Numero 72 - Esperantojaro 137 Nummer 72 - Jahr 2023

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO
ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN




# Regentag – Pluvotago

## La ŝipo de Friedensreich HUNDERTWASSER

# La Bulteneto

Numero 72 Esperanto-jaro 137

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
Tekstoj: Renate kaj Walter Klag
esperanto@chello.at
Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo

Foto de Walter Klag: La ŝipo „Regentag“ (Pluvotago) de HUNDERTWASSER en Tulno ĉe Danubo (Tulln an der Donau) dum la renovigado, ankoraŭ sen mastoj en marto 2023

# Friedensreich HUNDERTWASSER 1928-2000 kaj ties ŝipo „Regentag“.

Vizitantoj de la urbo Tulno ĉe Danubo (Tulln an der Donau) en Malsupra Aŭstrio, 40 km okcidente de Vieno, miris. Sur la bordo de Danubo, ekstere de la akvo, staris la ŝipo „Regentag“ (Pluvotago) de la fama universala artisto Friedensreich [frídensrajĥ] HUNDERTWASSER. Li laboris ne nur kiel pentristo kaj grafikisto, sed ĉefe kiel arkitekto kaj ekokonscia, naturmedia protektanto-aktivisto en la fundo de sia koro. Liaj lernojaroj kiel arkitekto komenciĝis per ŝipkonstruado en rilato kun la akiro de la transportŝipo „San Giuseppe T“ en Palermo, Italio, en 1967. En la jaroj 1968 ĝis 1974 li alikonstruis tiun transportŝipon kaj finfine nomis ĝin „Regentag“ (Pluvotago). Hundertwasser vivis kaj pentris sur Regentag dum dek jaroj. Dum tiu tempo la ŝipo estis lia ĉefa loĝejo. Nun necesas renovigado, kiu daŭros ĝis la jaro 2024.

## Eldiraĵoj de Hundertwasser

„Malebena planko estas melodio por la piedoj.”

„La rekta linio iĝis absoluta tiranaĵo.”

Fenestra Rajto (Fensterrecht): „Persono en luata loĝejo devas povi kliniĝi el la fenestro … kaj devas havi la rajton preni penikon kaj pentri sur ĉio, kion lia brako povas atingi.”

## Biografieto

15a de decembro 1928 Friedrich Stowasser, kiu ekde 1949 nomis sin Friedensreich Hundertwasser, naskiĝis en Vieno.

1929 13 tagojn post lia unua naskiĝdatreveno mortis lia patro pro apendicito.

1948 Abiturienta ekzameno en la gimnazio (tiam en Wiener Straße) de la urbeto Horn, en Malsupra Aŭstria, 100 km nordokcidente de Vieno, en regiono Waldviertel (arbara kvartalo).

En la sama jaro li malkovris en la muzeo Albertina verkojn de Klimt (1862-1918), Kampmann (1887-1945) kaj Schiele [ŝile] (1890-1918). Pentraĵojn de Schiele Hundertwasser havis ĉiam ĉe si. Schiele estis lia spirita patro.

Trimonata studado en Akademio por Figura Arto en Vieno.

1949 Vojaĝo tra Italio. Tie la artisto René Brô invitis lin al Parizo, kie li lernis kiel aŭtodidakto kal evoluigis sian ekologian konscion.

1951 Membro en Arta Klubo (Art Club). Unua el multaj ekspozicioj.

1953 Invento de la spiralo kaj la senlima linio kiel ĉefa motivo.

1958 Okupiĝo kun arkitekturo kaj urba etoso.

1959 Docento en Hamburga Altlernejo por Figura Arto, kie lia avangardeco estis oficiale agnoskita.

Surscenigo de la „Senlima Linio“. Kunlaboris la poetoj Bazon Brock [brok] kaj Herbert Schuldt [ŝuld]. Tiu „Hamburga Linio“ – ne oficiale permesita – kaŭzis skandalon kaj Hundertwasser finis la agadon.

1967 Hundertwasser akiris transportŝipon, kiun li 1968 ĝis 1974 alikonstruis kaj transformis al sia loĝ- kaj laborŝipo Regentag (Pluvotago).

En Decembro 1984 ne longe antaŭ Kristnasko li aktive subtenis kaj partumis la okupadon por la savo de la apudrivera arbaro ĉe Hainburg oriente de Vieno por malebligi la konstruadon de hidroelektra centralo en tiu arbaro. Li kampadis por unu semajno tie dum frosta temperaturo.

1991 Refigurado de la rubobruligejo Spittelau [ŝpiteláŭ] en la 9a distrikto de Vieno. Hundertwasser ne prenis monon por tiu laboro, sed postulis, ke en tuta Vieno estu organizita aparta kolektado de valora rubo por reciklado.

19a de Februaro 2000 li mortis 72jaraĝa pro subita korhalto sur la ŝipego Queen Elizabeth II. antaŭ Brisbano, Aŭstralio, kiam li estis survoje al Eŭropo post dujara restado en Nov-Zelando.

2020 En februaro studentoj re-surscenigis la „Hamburgan Linion“ en Leopold-Muzeo en Vieno.

# La ŝipo „Regentag“ (Pluvotago)

Jam kiel infano Hundertwasser okupiĝis kun ŝipoj. En liaj bildoj oni vidas ŝipojn, bov-okulojn kaj kamentubojn.

Hundertwasser rimarkis, ke pluvo igas la kolorojn en la naturo brilegi. Li amis la pluvon kaj diris, ke pluvotagoj estas labortagoj. Pluvotago estis por li bona tago. Dum pluvo li diris: „Mi estas feliĉa“. Post alikonstruado la ŝipo Regentag vidata de supre aspektas kiel longforma luma guto.

La ŝipo, kiu iĝis „Regentag“, estis sicilia-tunizia ligna motorŝipo por transporto de salo. Ĝi konstruiĝis en la jaro 1910. Ĝia longeco estis 11,9 metroj, la larĝeco 3,85 metroj, la mergiĝo 1,17 metroj kaj la volumeno 12,39 toneloj.

Hundertwasser aĉetis la ŝipon 1967 en Palermo, Italio. Li kaj kapitano Mimmo veturigis ĝin al Venecio. La alikonstruado de la ŝipo kun kapitano Antonio en la ŝipfarejoj en Palermo, Pellestrina (sude de Venecio), Portegrandi (10 km norde de Venecio), Malcontenta (10 km okcidente de Venecio), Portoferraio (sur insulo 60 km sude de Livorno), La Goulette (10 km oriente de Tuniso ĉe la marbordo) kaj Malto estis por Hundertwasser liaj unuaj praktikaj arkitekturlernojaroj, kiuj daŭris sep jarojn. Estis similaj problemoj kaj diskutadoj kiel dum postaj domkonstruadoj. Regentag estis kvazaŭ la unua realigita arkitekturprojekto de Hundertwasser.

Hundertwasser plilongigis la ŝipon de 11,9 m al 16,6 m longeco, plivastigis la ŝipan karenon al 4,5 m larĝeco kaj 4,65 m alteco. Li metis du mastojn, nove restrukturis pruon kaj pobon kaj figuris la supran konstruaĵojn kreive kaj nesimetrie.

Por testi la martaŭgecon de la ŝipo Hundertwasser entreprenis rondveturon en Mediteraneo, al Dalmatio, Sicilio, Korsiko, Elba, Malto, Tunizo, Kreto, Rodiso, Kipro kaj Israelo. Post la sukcesa testo Regentag veturis senprobleme de 1975 ĝis 1976 en 18 monatoj sub Kapitano Horst Wächter de Venecio tra Malto, Gibraltaro, Karibio (Okcidentaj Indioj), Panamo, Galapagoj kaj Tahitio al Nov-Zelando.

Hundertwasser estis kapitano surŝipe dum tiuj veturoj: En la Mediteraneo, en la Karibo kaj sur la fina itinero Tahitio – Rorotonga - Kermadec Islands – Auckland – Bay of Islands.

Jam kelkajn monatojn post la aĉeto de Regentag li akiris la licencon de ŝipestro en Palermo.

Li ŝatis vojaĝi malrapide. Same li diris ke “arto estas malrapida vojaĝo. Tempo estas tre efika helpanto. Kio kreskas malrapide, ne povas malsukcesi. Nur la rapidaj aferoj malsukcesas. Kreado bezonas tempon.”

Ekde 1976 ĝis 2004 Regentag estis sub la komando de Kapitano Andrew Fagan kaj Richard Smart.

1995 sinkis Regentag. Post la savo ĝi renoviĝis 1999 ĝis 2000 en Opua, Bay of Islands, en la nordo de Nov-Zelando. La ŝipo ricevis

kovraĵon el cemento. Krome la linio, kie la akva surfaco tuŝas la ŝipon, estis kahelumita.

En februaro 2000 Hundertwasser mortis kaj estis enterigita en sia propra grundo en Nov-Zelando. Li eterne ripozas en sia „Ĝardeno de la Feliĉaj Mortintoj“ sub tulipa arbo en Kaurinui.

Regentag transportiĝis en kontenera ŝipo de Nov-Zelando al Hamburgo kaj poste per basplanka kamiono al Tulln en Aŭstrio. La ŝipo montriĝis en la jaro 2004 en la kadro de la ekspozicio „Hundertwasser. Arto, homo, naturo“ en la iama Minorita Monaĥejo en Tulno ĉe Danubo (Tulln an der Donau) 40 km okcidente de Vieno. 2015 la ŝipo iĝis oficiale protektita monumento. La renovigado daŭros ĝis 2024.

Friedensreich Hundertwasser elektis „Regentag“ kiel sian trian nomon, ĉar li opiniis, ke dum pluvo la koloroj en la naturo iĝas pli vivaj. Poste li nomis sin „Malhelbunta“. La ŝipo Regentag simbolas gravan parton de la vivo de Hundertwasser. Dum dek jaroj li vivis kaj pentris sur ĝi. Ĝi estis lia hejmo, lando kaj ĉefa sidejo. Krome ĝi estas rimarkinda elstara naŭtika verko de la artisto, kiu aktivis en multaj kampoj.

Filmo: Hundertwassers Regentag

https://www.youtube.com/watch?v=KW9QOV1lRiA

https://de.wikipedia.org/wiki/Fensterrecht







Dum la renovigado en marto 2023 en Tulno ĉe Danubo.
Während der Renovierung im März 2023 in Tulln an der Donau.





La mozaiko indikas la akvolinion, do la nivelon de la akvo,
kiam la ŝipo naĝas.

Das Mosaik zeigt die Wasserlinie oder Tauchungslinie,
wenn das Schiff schwimmt.

Fotita en aprilo 2023.




La suba parto.
Videblas stirilo kaj helico.
Aprilo 2023.




Dum la renovigado en marto 2023 en Tulno ĉe Danubo.
Während der Renovierung im März 2023 in Tulln an der Donau.



Junio 2023. La ŝipo jam naĝas en la haveno de Tulno.

Renate KLAG kaj Walter KLAG

# Bitte beachten Sie auch die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag

# LA MONO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO




Serio 1 + 5 + 10 Steloj, eldonita 1959, prezo de la serio 120 €.




50 Steloj  Julia Isbrücker, eldonita 2020, prezo 89 €.




100 Steloj  René de Saussure, eldonita 2018, prezo 89 €.

Sendokostoj 10 € por unu paketo. Validas por Eŭro-landoj.

Bonvole sendu vian mendon al  esperanto@chello.at.




Die Münze Österreich AG

Wien 3., Am Heumarkt 1

Pregejo de la arĝentaj

100 Steloj kaj 50 Steloj

# STELO-TABELO

| Nominalo | Materialo | Maso | Dia-metro | Jaro | Eldon-kvanto | Prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 Stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 5 Steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 10 Steloj | Cu – Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 25 Steloj | Cu-Ni 75-25 | 19 g | 37 mm | 1965 | 1000 | 200 € |
| 25 Steloj | Ag 900/1000 | 25 g | 37 mm | 1965 | 5000 | 200 € |
| 25 Steloj | Au 983/1000 | 50 g | 37 mm | 1965 | 10 | 5000 € |
| 1 Stelo | Plasto ruĝa | 0,8 g | 23 mm | 2012 | 3000 | 1 € |
| 3 Steloj | Plasto flava | 0,9 g | 25 mm | 2012 | 3000 | 3 € |
| 10 Steloj | Plasto verda | 1,3 g | 29 mm | 2012 | 3000 | 10 € |
| 100 Steloj | Ag 999/1000[2] | 31,1 g<br>1 unco | 37 mm | 2018[3] | 1000 | 89 € |
| 50 Steloj | Ag 925/1000 | 30,0 g | 40 mm | 2020 | 300 | 89 € |




Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.
Produktado de la 100- kaj 50-stela monero-medaloj: Münze Österreich.
Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgio.
Informo pri la aktualaj prezoj ĉe esperanto@chello.at. Kelkaj moneroj estas ne tuj livereblaj.

---

[1] Pregitaj en la jaro 1960
[2] La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.
[3] Pregita en la jaro 2017

# Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko” (EN), probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum naŭ jaroj ĝis 160 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo en 45 landoj.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidos poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”

# Esperanto en Vieno

Vizitu niajn renkontiĝojn en la hejmeca, tipe Viena kafejo AIDA

en la naŭa distrikto, Währinger Straße 47.

La aktualajn informojn vi ricevas de

esperanto@chello.at




La kafejo AIDA

Haltejo Spitalgasse de la tramlinioj 5, 33, 37, 38, 40, 41 kaj 42



# Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3
☏ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage**

Im selben Haus befindet sich auch die
**Musikaliensammlung**
und das
**Globenmuseum**